

## 5

### Urspiedoj

Proke la urso ne devis esti portata troe for, la tendejo estis antaŭigita dum mia foresto ĝis en la proksimeco de la loko, kie mi mortigis ĝin. La besto estis tiel peza, ke dek fortaj viroj devis porti ĝin de sub la arboj, kaj tra la arbedaro, al la brulantaj fajroj en la liberejo.

Malgraŭ la malfrua horo, ĉiu ne jam dormis, escepte de Rattler. Li findormis sian ebrion. Oni devis veturi lin al la nova tendejo, kaj oni ĵetis lin sur la herbejon kiel lignan blokon. Sam estis senhaŭtiginta la urson, sed lasis la viandon netuŝite. Kiam mi deĉevaliĝis, kaj paŝis al la fajro, la malgrnadulo diris:

„Kie do Vi kaŝiĝis, *Sir*? Ni atendadis Vin dolore, ĉar ni volis provi la ursviandon, kaj ne povis ektranĉi la sinjoron grizulon sen Vi. Mi intertempe deprenis ĝian ĉemizon. Estis tiel bone surmetita de la tajloro, ke ĝi ne havis eĉ plej etan faldaĵon, hihihhi. M'esperas, ke Vi ne kontraŭas, ĉu? Nu diru nun, kiel la viando estu disdonota! Ni volas rosti pecon de ĝi, antaŭ ni kuŝiĝas pro dormi.“

„Ĝin partigu kiel Vi volas“, mi respondis. „La viando estu por ĉiuj.“

„*Well*, do mi volas diri ion al Vi. La plej bonaj partoj estas la piedegoj. Ekzistas tute nenio, kio pli bonas ol urspiedoj. Sed ili kuŝu iom da tempo, ĝis ili ricevas la decan ĉasbestan guston. Ili estas plej delikataj, kiam ili jam estas tratruitaj de vermoj. Sed ni ne povas atendi tiel longe. Mi timas, ke la apaĉoj baldaŭ venos, kaj malgajigos la manĝadon. Tial ni pli bone okupiĝu pri la piedegoj nun, proke ni jam estis gustumintaj ilin, antaŭ la ruĝuloj neigos nin. Ĉu Vi kontraŭas, *Sir*?“

„Ne.“

„*Well*, do ni komencu la belan laboron, se mi n'eraras“

Li tranĉis la piedegoj de la kruoj, kaj partigis ilin al tiom partoj, kiom da personoj ĉeestis. Mi ricevis la plej bonan parton de antaŭa piedo, ĝin volvis en ŝtofaĵon, kaj metis ĝin flanken. La aliaj haste portis iliajn partojn al la fajro. Post mia longa, streĉa rajdado, mi ja certe sentis malsaton en miaj internaĵoj, sed ne eblis al mi manĝi ion. Ankoraŭ mi ne povis forgesi la murdon de Klekih-petra. Tie kuŝis la murdinto, ankoraŭ sensece ebria. Mi povis mortpafi lin ŝate, sed mi sentis naŭzon pri li. Tiu sento de naŭzo certe ankaŭ estis la kaŭzo, ke la du apaĉoj ne estis punintaj lin tuj.

Se ajn io povis min trankviligi pri la sanga okazaĵo, tio estis la fakto, ke Klekih-petra ekmortis ĉe la koro de Winnetou, ke lia koro enkaptis la kuglon, kiu celis al Winnetou. Sed kio pri la peto al mi, pri resti ĉe Winnetou, kaj kompletigi la komencitan laboron? Kial li ĝin diris al mi? Entute, kial mi faris mian promeson al la mortanto tiel rapide? Ĉu per kompato? Jes, boneble. Sed ankaŭ estis alia kaŭzo, senke mi estis plene konsciante pri ĝi: Winnetou faris profundan impreson al mi, impreson, kian mi neniam antaŭe havis de iu alia homo. Dum la

aliaj lasis la viandon bongusti al ili, mi sidadis apud la fajro, longe pensante, ĝis Sam Hawkens vekis min el miaj revoj:

„Kio estas pri Vi, *Sir*? Ĉu Vi ne malsatas?“

„Mi manĝos nenion.“

„Nul! Vi do preferas ekzercadi pensi, ĉu? Mi diras al Vi, Vi ne devas kutimiĝi al tio. Ankaŭ min ĉagrenas, kio okazis, sed la okzidentulo kutimiĝu al tiuj scenoj. Oni ne nomas la okzidenton vane la *„dark and bloody grounds“* — la tenebra kaj sanga tero. Vi povas ĝin kredi, ke la tero tie ĉi trinkis jam amason da sango. Kiu havas senteman nazon, restu hejme kaj trinku sukerakvon. Ne pripensu la aferon tro multe, kaj donu al mi vian piedegaĵon. mi ĝin rostas por Vi!“

„Dankon, Sam. Sed mi vere ne manĝos ion. Ĉu Vi decidis, kion ni faru kun Rattler?“

„Certe ni parolis pri tio.“

„Nu, kiu estos lia puno?“

„Puno, ĉu? Ĉu Vi opinias, ke ni punu lin?“

„Memkompreneble mi opinias tion.“

„Nul! Kaj kiel ni faru tion? Ĉu ni portu lin al San Francisco, New York aŭ Washington, kaj akuzu lin tie kiel murdisto?“

„Stultajo! La aŭtoritato, kiu juĝu pri li, estas ni mem. Li estu punota laŭ la leĝoj de la okzidentulo.“

„Nu vidu, kion scias tia *greenhorn* pri la leĝoj de la sovaĝa okzidentulo! Ĉu Vi do transvenis el la olda *Germany*, pro ludi la plej altan ĉefjuĝiston? Ĉu tiu Klekih-petra estis parenculo, aŭ bona amiko de Vi?“

„Ne vere.“

„Jen la punkto, kiu valoras. Jes, la sovaĝa okzidentulo havas siajn proprajn leĝojn. Ĝi postulas okulon pro okulo, denton pro dento, sangon pro sango, kiel ĝi estas skribita en la biblio. Se murdo okazigis, tiu ulo, kiu rajtas ĝin, povas tuj mortigi la murdinton, aŭ oni formigas juĝantaron, kiu interkonsentiĝas juĝon, kaj tuj realigas ĝin. En tiu maniero oni liberiĝas de la fruloj kaj krimuloj, kiuj alikaze estiĝos penego al la honestaj ĉasistoj.“

„Bone, do ni formigu juĝantaron.“

„Pro tio unue necesus akuzanto.“

„Tiu estas mi!“

„Per kiu rajto?“

„Per la rajto de la homo, kiu ne povas toleri, ke tiu krimo restu nepunigata.“

„*Pshaw!* Vi parolas kiel *greenhorn!* Vi povas esti akuzanto nur en du kazoj. Unue, se la murdisto estis proksimume al Vi kiel parenculo aŭ kunulo. Due Vi povus esti akuzanto, kiam Vi mem estus la murdisto, hihihih. Ĉu Vi estas tiu?“

„Sam, la afero estas tro serioza, ke oni povus ridi pri ĝi.“

„Mĵa scias, scias! Mĵa volis nur aligu tiun punkton pro kompleteco. Do, Vi havas neniun kaŭzon roli kiel akuzanto. Kaj kie ne estas akuzanto, tie ne estas juĝisto. Ekzistas neniu ebleco formigi juĝantaron.“

„Do Vi pensas, ke Rattler eliĝu el la afero senpunite?“

„Tion mi ne diris. Ne ekscitiĝu. Mi promesas al Vi, ke la venĝo trafos lin tiel certe, kiel ĉiu kuglo el mia Liddy trafas sian celon. La apaĉoj zorgos pri tio.“

„Sed ilia venĝo ankaŭ trafos nin!“

„Tre verŝajne. Sed ĉu Vi opinias, ke ni povus eviti tion, perke ni mortigas Rattler-on? Kune kriminta, kune kaptata, kune krucumota. La apaĉoj supozas ne lin sole esti la murdinto, sed ankaŭ nin, kaj ili certe traktos nin kiel murdintoj, kiam ili kaptos nin. Ili pafos nin teren sen demandi, ĉu li estas ĉe ni aŭ ne. Cetere, kion volas fari Vi kun Rattler?“

„Forpeli lin.“

„Pri tio ni ankaŭ estis parolinta, Sed unue, ni ne havas la rajton forpeli lion, kaj due, ni ne farus tion, eĉ se ni rajtus.“

„Sam, mi ne komprenas Vin! Kiam iu maltaŭgas al mi, mi disiĝas de li. Ĉu ni vere devas toleri tian fiulon ĉe ni, kiu krome estas drinkulo, kaj ĉiam denove endanĝerigas nin?“

„Jes, bedaŭrinde ni devas. Rattler estas dungita por la mezurada laboro, same kiel mi, Stone kaj Parker. Nur kiu dungis kaj pagas lin, rajtas maldungi lin. Ni strikte obeu la juran situacion.“

„La juran situacion! Eĉ pri homo, kiu malrespektas la leĝojn de Dio kaj de la homoj ĉiun tagon, ĉu?“

„Eĉ tiukaze! Ja bonas ĉio, kion Vi diras. Sed oni nepre ne faru eraron, nur ĉar iu alia faris krimaĵon. Cetere, kion Rattler faru, se li estus forpelota de ni?“

„Estus afero lia!“

„Ni estu en danĝero ĉiun momenton, ĉar certe li provus sin venĝi pri ni. Do estas pli bone teni lin ĉe ni, kie ni povas rigardi lin, olke li ĉirkaŭirus libere kaj certeble pafus kuglon en ĉiun kapon, kiun li ne ŝatas. Mi pensas, ke Vi komprenos tion.“

Li vidis al mi dum tio kun mieno, kiun mi komprenis tre bone. Tiam li mallonge vidis transe al la anoj de Rattler. Se ni estus agonta kontraŭ Rattler, estis timenda, ke ili transiĝus je lia flanko.

„Jes, nun, kiam Vi klarigis la aferon al mi, mi komprenas, ke ni devas lasi okaziĝi ĉion, kiel ĝi okaziĝos. Mi nur maltrankvilas pri la apaĉoj, ĉar estas sendube, ke ili venos pro sin venĝi.“

„Ili certe venos, kaj ju pli certe, des ili ne elparolis unu vorton de minaco. Ili agis ne nur tre fiere, sed ankaŭ tre saĝe. Se ili estus sin venĝintaj tuje, tio ja estis nur rilatiĝinta pri Rattler. Sed ili celas al ni ĉiuj, ĉar li apartenas al ni, kaj ĉar ili supozas nin esti iliaj malamikoj, kiuj volas rabi ilian landon kaj posedaĵon per la mezurado. Tial ili sin regis tiel, kaj forrajdis sen movi unu fingron kontraŭ ni. Des pli certe ili revenos, pro kapti nin ĉiujn. Se ili sukcesos tion, ni devas pretiĝi por malica ekmorto. La respekto, kiun tiu Klekih-petra havis inter ili, postulas duoble kaj trioble egan venĝon.“

„Certe! Ĉio dependas, de kiam ili aperos. Nun ni ankoraŭ havas sufiĉe da tempo pro fuĝi, sed tiukaze ni devus lasi ĉion tie ĉi, kaj la laboron nur preskaŭ finigite.“

„Tion ni ne rajtas fari, se ĝi nur ajn iel eblas.“

„Kiam Vi povas esti finiginta la laboron, se Vi hastas, laŭ Via takso?“

„Post kvin tagoj.“

„Hm! Laŭ mia scio, ne estas apaĉaj tendetoj en la proksimeco. Se mi devus, mi serĉus la plej proksimajn meskalerojn almenaŭ tri tagrajddadojn for de tie ĉi. Se mi ne eraras, Intŝu-tŝuna

kaj Winnetou rajdadas kvar tagojn, ĉar ili ja transportu la mortulon, antaŭ ili atingos iliajn trupojn. Plus tri tagojn reen tien ĉi, tio estas sep tagoj. Do kiam Vi kredas, ke Vi povos esti finiginta la laboron post kvin tagoj, ni rajtas riski la finigon de la mezuradoj.“

„Sed kio, se Via kalkulo ne ĝustas? Ja ankaŭ eblas, ke la du apaĉoj intertempe lasas la mortulon en sekuran lokon, kaj revenos pro pafi al ni de kaŝejo? Krome boneblas, ke ili trovas trupon de ilia anaro jam multe pli frue. Eĉ povas esti, ke ili havas amikojn en la proksimejo, ĉar ĝi vere mirigus min, se du indianoj, eĉ ĉefoj, malproksimiĝas tiel for de loĝejo. Ĉar nun estas la tempo de la bubalĉasado ankaŭ eblas, ke Intŝu-tŝuna kaj Winnetou apartenas al ĉasgrupo, kiu troviĝas ĉi proksime, kaj el kiu ili eliĝis nur mallongan tempon pro ajn iu kaŭzo. Ĉi ĉio pripensendas, se ni volas agi ningarde.“

Sam Hawkens premfermis unu el siaj du etaj okuloj, faris mirigitan grimacon, kaj vokis:

„*Heavens*, kiel saĝa kaj prudenta Vi ja estas! Vere, nuntempe la kokidoj estas dekoble pli saĝaj ol la kokino, se mi n'eraras. Sed, pro la honoro de la vereco, kion Vi diris, estis tute ne dirita stulte. Mi eĉ diru, ke Vi komplete pravas. Ni ekspektu ajn ĉiun eblecon. Tial ni devas ekscii, al kiu direkto la du apaĉoj turniĝis. Do mi sekvos ilin kaŝe je la frua mateno.“

„Kaj mi kunrajdos“, Will Parker diris.

„Mi ankaŭ“, Dick Stone deklaris.

Sam Hawkens pripensadis iomete, tiam li decidis:

„Vi restos dece tie ĉi, ĉar Vi estas bezonataj tie ĉi. Komprenendas!“ Dum tio li transvidis al la kunuloj de Rattler. Sam pravus. Se tiuj nefidindaj homoj estus solaj kun ni, estus ekspektindaj malĉarmaj surprizoj post la vekiĝo je la sekvinta mateno. Do ĝi estus pli bone, se Stone kaj Parker povis helpi al ni.

„Sed Vi ja ne povas rajdi sole!“ Will Parker diris.

„Mi povus, se mi volus, sed mi ne volas“, Sam respondis. „M'elektos akompananto por mi.“

„Kiun?“

„Tiun ĉi junan *greenhorn:on*.“

Dum tio li mansignis al mi.

„Ne, li ne foriru“, deklaris la ĉefinĝeniero.

„Kial ne, Mr. Bancroft?“

„Ĉar mi bezonas lin.“

„Sciindas, pro kio!“

„Pro la laboro, memkompreneble. Se ni volas esti finigitaj post kvin tagoj, ni streĉigu ĉiujn niajn fortojn. Mi povas rezigni pri neniu.“

„Jes, streĉigu ĉiujn fortojn. Ĝis nun Vi tion ja ne faris. Anstataŭe unu devis labori por ĉiuj. Nun foje ĉiuj streĉiĝu por tiu unu.“

„Mr. Hawkens, do ĉu Vi volas ordoni al mi? Tion mi malpermesas!“

„Ne ideis al mi. Komento ja tute ne estas ordono.“

„Sed tiel ĝi sonis!“

„Boneble, kaj mi ja ne kontraŭas. Kaj parolante pri Via laboro, certe ne estos tiel ega malrapidigo, kiam partoprenus kvar anstatataŭ kvin homoj. Mi fakte havas la certan intencon kunpreni tiun junan *greenhorn:on*, kiu estis nomita Shatterhand.“

„Ĉu Vi permesas, ke mi demandas pri la kialo?“

„Kial ne? Li foje vidu, kiel oni ĝin faras, kiam oni kaŝsekvas indianojn. Certe estos utile al li, se li povas ĝuste legi spuron.“

„Tio sed ne ŝajnas grave al mi.“

„Mĵa scias. Krome estas dua kialo. La vojo, sur kiun mi iĝos, tre danĝeras. Estas simple pli bone por mi kaj Vi, se mi kunhavas akompananton, kiu posedas tian korporforton, kaj tiel bone scias uzi sian ursmortigilon.“

„Mi ne tute komprenas, kial tio estu avantaĝo ankaŭ al ni.“

„Ĉu ne? Tio mirigas min. Vi ja estas eksternorme ruza kaj prudenta *gentleman* ĝenerale“, Sam moke respondis. „Kio do okazu, se mi renkontas malamikojn, kiuj estas survoje tien ĉi, kaj neigas min? Tiukaze neniu povus sciigi Vin pri la alvenanta danĝero. Vi estus atakotaj kaj mortigotaj. Sed se mi kunhavas tiun *greenhorn*-on, kiu smeŝas la plej solidan viron sur la teron per unu batego de siaj etaj manoj, estas tre verŝajne, ke ni revenos hejmen kun sana korpo. Ĉu Vi komprenas tion?“

„Hm, jes.“

„Kaj nun venas la ĉefaĵo: li kunrajdu morgaŭ, proke okaziĝos neniu kverelaĵo, kiu eble finiĝos malfeliĉe. Li ja scias, ke Rattler estas speciale malamikeceme pri li. Kiam tiu amanto de la brandoglaso morgaŭ vekigās, estas tre verŝajne, ke li tuj fiatakas la ulon, kiu lin batis senkonscien hodiaŭ. Ni disigu tiujn du, almenaŭ morgaŭ. Tial restu ĉi tie tiu el la du, kiu ne utilis al mi, kaj la alia iru kun mi. Ĉu Vi nun ankoraŭ kontraŭas pri tio?“

„Ne. Laŭ mi, li rajdu kun Vi.“

„Well, do ni interkonsentas.“ Sam turniĝis al mi: „Vi aŭdis, kio atendas Vin. Bone eblas, ke ni morgaŭ havos neniun tempon por manĝado aŭ restado. Tial mi petas Vin, ke Vi nun bonvolu gustumi almenaŭ kelkajn murdetojn de Via urspiedaĵo.“

„Je tiuj cirkonstancoj, mi volas almenaŭ provi ĝin.“

„Nur provu, provu do! Mi konas tiajn provojn, hihihih! Oni enprenas nur murdon, kaj tiam tutcerte ne ĉesas, ĝis oni ne havas ion plu. Donu la piedaĵon al mi, mi rostos ĝin por Vi. Tia *greenhorn* ne havas la bezonatan sperton pri tio. Sed bone atentu, ke Vi ĝin lernas. Se mi devus varmigi tian delikataĵon fojon plu, Vi ricevos neniom da ĝi, ĉar mi ĝin manĝus mem.“

La bona Sam pravis. Apenaŭ mi ekprovis la unuan mordaĵon, mia foriginta apetito revenis. Mi forgesis ĉion, kio estis afliktinta min, kaj fakte manĝadis tiel longe, ĝis neniom postrestis.

„Ĉu mi ne diris ĝin?“ li demandis ridante. „Estas vere multe pli granda plezuro manĝi grizurson, ol venki ĝin. Nun ni tranĉu kelkajn pezajn pecojn de la ŝinko, kaj ankaŭ rostu ilin ankoraŭ hodiaŭ. Tiujn ni kunprenos morgaŭ, kiel nutraĵoj. Dum tiuj esploraj rajdadoj oni ĉiam ekspektu, ke oni ne povos bruligi fajron, pro rosti ion. Vi nun dormiĝu, kaj faru rapidan, profundan dormon. Ni ekrajdos morgaŭ je la matenruĝo, kaj bezonos ĉiujn fortojn.“

„Well, do mi dormos. Sed antaŭe diru al mi, kiun ĉevalon Vi rajdos.“

„Stulta demando! Ĉu vi opinias, ke mi sidiĝu sur krokodilon, aŭ ian alian birdon? Mi rajdos mian mulon, memkompreneble, mian novan Maryn.“

„Mi farus tion ne.“

„Kial ne?“

„Vi ne jam konas ĝin sufiĉe bone.“

„Sed ĝi tutekzakte konas min. Havas fortan respekton antaŭ mi, tiu bestaĉo, hihihih!“

„Sed dum tia kaŝesplora rajdado oni estu tre atenta, kaj antaŭe pripensinta ĉion. Rajdbesto, kiun oni ne sufiĉe konas, ja povas fuŝi ĉion.“

„Nu. Ĉu vere?“ li diris rikane.

„Jes“, mi respondis fervore. „Mi scias, ke la spirego de ĉevalo povas kosti la vivon al la rajdanto.“

„Ha, tion Vi scias, ĉu? Ruza ulo! Certe Vi ankaŭ legis tion, ĉu, *Sir*?“

„Jes.“

„Mĝin scii! Ĝi ja vere estu tre interese legi tiajn librojn. Se mi ne estus okcidentulon mem, mi tuj irus en la orienton, sidiĝus tie dece komforte sur sofon, kaj legadus belajn rakontojn pri indianoj. Mi kredas, ke oni tiel povas dikiĝi kaj grasiĝi, kvankam oni konsumas la urspiedegojn nur depapere. Mĝvere volas scii, ĉu la bonaj *gentleman*-oj, kiuj skribas tiajn aĵojn, venis nur unu fojon trans la Mississippi!“

„La plej multaj el ili, verŝajne.“

„Mĝne kredas ĝin. Mi havas miajn tute bonajn kaŭzojn, dubi pri tio.“

„Kaj kiuj estas tiuj kaŭzoj?“

„Mi ĝin diros al Vi, *Sir*. Unu mano, kiu kondukadis ĉevalon, kaj ĵetadis la lazon longan tempon, simple ne taŭgas plu bele desegnadi liniaĉojn sur paperon. Kiu estas vera okcidentulo, tiu forgesis kiel skribi, kaj kiu estas ne, tiu pli bone eĉ ne komencu skribi pri aferoj, kiujn li ne komprenas.“

„Hm! Se oni volas skribi libron pri la okcidento, oni ja ne nepre restu tie tiel longe, ĝis oni ne plu havas skribdiartrojn en la fingroj.“

„Miskonkludite, *Sir*! Mi ĵus diris, ke nur deca okcidentulo povus skribi prave kaj laŭverece. Sed tia homo ne havus la tempon por tio.“

„Kial?“

„Ĉar ne ekideos al li forlasi la okcidenton, kie ne ekzistas inkujoj. Ne, ĉiuj tiuj libroskribistoj ne konas la okcidenton, ĉar se ili estus koniĝintaj ĝin, ili neniam ĝin estus forlasintaj, nur pro nigriĝi kelkajn cent paĝojn per inko. Tio estas mia supozo, kaj mi tree taksas, ke ĝi ĝustas.“

„Ne. Mi, ekzemple, konas iun, kiu lernis ami la okcidenton, kaj volas estiĝi deca ĉasisto. Tamen li intertempe reiros en la civilizacion, pro skribi pri la okcidento.“

„Nu? Kiu estas tiu?“ li demandis, dum li vidis al mi scivole.

„Vi povus ĝin scii.“

„Ĉu scii? Mi, ĉu? Ĉu Vi do eĉ parolis pri Vi mem?“

„Jes.“

„Fulmotondro! Vi do volas Vin iĝi en la aron de la senutila popolo de la librofarantoj, ĉu?“

„Verŝajne.“

„Lasu tion, *Sir*. Mi petas Vin pri tio elkore. Vi pereos per tio, aĉe. Vi povas kredi tion.“

„Mi dubas pri tio.“

„Kaj mi certigas tion. Mi eĉ certigegas tion“, li haste vokis. „Nu ĉu Vi havas etan ideon pri la vivo, kiun atendus Vin tiukaze? Anstataŭ la bonega fontakvo, Vi trinku mallikvan, nigran inkon, kaj Vi murdu maljunan anasplumon, anstataŭ urspiedegaĵon aŭ buballumbaĵon.“

Anstataŭ la blua ĉielo, Vi havus super Vi ia pecetiĝan kalkplafonon, kaj anstataŭ la softa, verda herbejo Vi havus sub Vi ia ligna kuŝejaĉo, per kiu Vi havos dorsdoloron. Ĉi tie Vi havas ĉevalon, tie nur eluzitan remburitan seĝon sub la postaĵo. Ĉi tie Vi povas rekte ĝui la benan donacon de Dio je ĉiu pluvo kaj fulmotondro, sed tie Vi levigas ruĝan aŭ verdan ŝirmilon kontraŭ la ĉielo je ĉiu unua guto. Ĉi tie Vi estas lerta, fidela, libera viro, kun la pafilo en la pugno, tie Vi kaŭraĉas je skribotablo, kaj malŝparas fian forton al plumingo aŭ krajono — nu, mi ĉesu kaj ne plu ekscitiĝu. Sed se Vi vere havas la intencon skribi librojn, Vi esta la plej bedaŭrinda homo, kiu ekzistas sur la bela tero de Dio!“

„Sed, plej kara Sam“, mi diris kvietige, „fakte ĝi ja estus granda ĝojo al Vi, se mi plenumigus mian intencon.“

„Ĝojo, ĉu? Ĉu al mi? Ne ĝenu min per tiaj sensencaĵoj! Vi finfine devus scii, ke mi ne povas elteni tiajn ŝercojn! Pri kio mi ĝoju do?“

„Pri Vi.“

„Pri mi!“

„Jes, pri Vi mem. Vi ja aperos en miaj libroj.“

„Ĉu mi?“ li demandis, kaj dum tio liaj okuletoj ĉiam pli kaj pli grandiĝis.

„Jes, Vi. Memkompreneble mi ankaŭ skribos pri Vi.“

„Pri mi! Sed ja ne pri tio, kion mi faras kaj parolas, ĉu?“

„Sed jes. Mi rakontos, kion mi spertis, kaj ĉar mi kunestis kun Vi, Vi ankaŭ aperos en miaj libroj, ekzakte tiel, kiel Vi tie sidas antaŭ mi.“

Li ekprenis sian pafilon, ĵetis flanken la ŝinkaĵon, kiun li estis teninta super la fajro, saltis supren, sin starigis minacante antaŭ min, kaj kriis en mian vizaĝon:

„Mi demandas Vin, tute serioze, kaj antaŭ ĉiuj tiuj atestantoj: ĉu Vi vere intencas fari tion?“

„Memkompreneble!“

„Nu! Tiukaze mi postulas, ke Vi tuj reprenas tion, kaj promesas al mi, per honestaj ĵuroj, ke Vin ĝin lasos!“

„Kial?“

„Ĉar alikaze mi tuj mortpafos Vin, aŭ batos Vin teren per ĉi Liddy, kiun mi tenas en miaj manoj. Nu, ĉu Vi promesas aŭ ne?“

„Ne.“

„Do mi batos!“ li kriis, kaj reensvinis la tenilon de sia Liddy.

„Nu, ekbatu!“ mi respondis amuzigite.

Kelkajn momentojn la tenilo ŝvebis super mia kapo. Tiam li malrapide mallevis ĝin, ĵetis la pafilon sur la herbejon, malesperante kunigis la manojn super la kapo, kaj ĝemis:

„Tiu homo perdis sian prudenton, freneziĝis, tute freneziĝis! Nur frenezulo povas resti sidante tiel trankvile, kiam mia Liddy ŝvebas super lia kapo. Kion nur oni faru kun tia viro? Mi kredas, ke li apenaŭ estas kuracebla!“

„Mi ne bezonas kuracon, kara Sam“, mii respondis. „Mia menso estas tute klara.“

„Sed kial Vi tiukaze ne obeas mian volon? kial Vi rifuzas al mi la ĵurojn, kaj pli prefere riskas esti mortbatata?“

„*Pshaw!* Sam Hawkens ne mortbatos min. Tion mi scias ekzakte.“

„Tion Vi scias, ĉu? Nu nu, tion Vi do scias, ĉu? Kaj bedaŭrinde, Vi eĉ pravas. Mi pli prefere mortbatos min mem, ol nur faldi unu haron de Vi.“

„Kaj ĵurojn mi ne faras. De mi vorto valoras egale kiel ĵuro. Kaj cetere mi ne lasas elpremi ĵuron de mi per minacoj. La afero pri la libro ne estas tiel stulta, kiel Vi opinias. Vi simple nur ne konas ĝin. Mi klarigos tion al Vi, kiam ni havos pli da tempo.“

„Dankon!“ li diris, sidiĝante kaj reprenante la ŝinkaĵon. „M'ne bezonas klarigon. Ridinde!“

„Sed pripensu la honoron, Sam!“

„Kiun honoron?“ li demandis, returniĝante sian vizaĝon eke al mi.

„La honoro, ke tiom multaj homoj legos pri Vi. Vi famiĝos per tio.“

Li eklevis la manon kun la ŝinkaĵo alte supren en la aeron, kaj kriis al mi:

„*Sir*, nun tuj ĉesu, aŭ mi ĵetos tiujn dek du funtojn da ursoŝinkaĵo sur Vian kapon! La ŝinkaĵo vere estu tie, ĉar Vi estas eĉ pli stulta ol la plej stulta grizurso. Mi diras al Vi, kiel oni povas famiĝi. Tie estas la ursofelo, vidu al ĝi! Detranĉu la orelojn, kaj fiksigu ilin sur Vian ĉapelon! Prenu la ungegojn de la piedoj, kaj la dentojn el la buŝego, kaj metu aron el ili ĉirkaŭ Via kolo! Tion faras ĉiu okcidentulo kaj ĉiu indiano, kiu havis la ŝancon venki grizurson. Tiam oni diros, ajn kien li iras kaj nur vidas lin: „Rigardu la viron! Li kuraĝis ataki grizurson!“ Tiel oni famiĝas. Komprenende! Sed, nu fiksigu Viajn librojn al la ĉapelo, kaj metu libron ĉirkaŭ Vian kolon! Kion oni dirus tiam, ĉu? Ke Vi estas freneza ulo, tute freneza ulo! Tiam famaĉon, kaj neniun alian Vi ricevos per Via libroskribado!“

„Sed, Sam, pri kio Vi do tiel ekscitiĝas? Ja povus esti tute egale al Vi, kion mi faras.“

„Nu! Egale al mi ĉu? Je ĉiuj diabloj, kia homo tiu estas, se mi n'eraras. Mi amas lin kiel filon, kaj tute perdas mian menson pri li, kaj nun ĝi estu egale al mi, kion li faras, ĉu? Tio ja batas. Tio batas plie ol ĝi nur batas, tio bategas! Tiu ulo havas forton de bubalo, muskolojn de mustango, tendenoj de cervo, okulojn de falko, aŭdokapablon de muso, kaj certa amason da kvin aŭ ses funtoj da cerbo en la kapo. Li paŝas kiel spertulo, rajdas kiel fantomo de la savano, kaj atakas la grizurson, kvankam li nenie antaŭe vidis ĝin, kvazaŭ li ekrenkontus porcelon. Kaj tia homo, kiu estis kreita pro esti okcidentulo, volas iri hejmen kaj skribi librojn! Kiel oni freneziĝu ne pri tio? Ĉu tiukaze oni vere miru, ke deca okcidentulo koleriĝas?“

Li vidis al mi provoke dum tio. Li klarvideble atendis respondon. Sed mi ne respondis, sed altiris la selon, metis mian kapon sur ĝin, kuŝiĝis laŭlonge sur la teron, kaj fermis la okulojn.

„Kia konduto estas denove tiu?“ li demandos, ankoraŭ tenante la ŝinkaĵon en la mano. „Ĉu mi do ne meritas respondon?“

„Sed jes“, mi respondis. „Bonan nokton, kara Sam. Dormu bone!“

„Vi volas dormi, ĉu?“

„Jes. Vi ja ordonis ĝin al mi!“

„Tio estis tiutempe. Sed nuntempe ni ne estas finparolinta, *Sir*.“

„Ni finparolis.“

„Ne. Mi ankoraŭ paroli kun Vi.“

„Sed ne mi kun Vi. Mi nun scias, kion mi volis scii.“

„Vi scivolis, ĉu? Nu kion?“

„Ho, fakte nenion, kromke mi estas kreita pro esti okcidentulo.“

Li mallevis la manon kun la ŝinkaĵo, tuis kelkajn fojon tre hontigita, kaj diris:

„Fulmo—tondro! Tiu juna ulo — tiu greenhron — min — hm, hm, hm!“

„Bonan nokton, Sam Hawkens, dormu bone!“ mi ripetis, kaj deturniĝis.

Li ĵetis koleran vidon al mi, kaj kraĉospiris al mi:

„Jes, dormu, Vi fimistifikulo. Estas multe pli bone, olke Vi vekas. Ĉar kiam Viaj okuloj estas malfermataj, neniu honesta viro estas sava antaŭ Via mistifikado. La afero inter ni estas je la fino! Vi fuŝis ĉion inter ni! Mi nun konas Vin pli klare. Vi estas fiaĉulo, kies ĉeeston oni pli bone evitu!“

Tion li diris en sia plej kolera sono. Post tiuj vortoj kaj tiu sono, mi fakte povus supozi, ke la afero vere finiĝis. Sed jam duonan minuton poste, mi aŭdis lin aligi per softa, amikeca voĉo:

„Bonan nokton, Sir. Ekdormu rapide, proke Vi fortos, kiam mi vekigos Vin!“